Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 18 — Trimonata

2/89

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: István Ertl

REDAKTA KOMITATO

Carlevaro, T. (CH)
Formizzi, G. (I)
Lins, U. (D)
Ludwig, E. (F)
Maitzen, M. (A)
Mallia, C. (M)
Mizuno, Y. (J)
Szerdahelyi I. (H)

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK
H-1364 Budapest, Pf. 107
☎ 36 1 180 966/185

Presado: Grafika Centro Antverpeno,
Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

KOVÁCS, Marta, Kvinlanda Pedagogia-Didaktika Eksperimento 1
FIEDLER, Sabine, Fakvortoj el la sfero 'Universitata Medio" 9
GARCÍA BLÁZQUZ, Félix, La sufikso -iĝ ĉe apliko al verboj 15
ZHANG Danchen, Instruprogramo de Esperanto por ĉinaj altlernejoj 22
GONIN, Jacqueline, Pri infanlibroj en Esperanto 23
KARAMUDINI, Mohammad, Dek kvin jaroj da instruada progreso 27
KLAG, Walter, Reformita gimnazio de Aŭstrio 29
Mallongaj novaĵoj el diversaj landoj 30
MIE – Monato de Internacia Enketado (kun resendenda enketilo) 34

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto : Edward Symoens, Putsesteenweg 131/A, B-2180 Heide (Kalmthout); tel. (03)666.62.66 — Kunordigado, informado en pedagogiaj medioj, rilatoj kun Unesko kaj UEA.

Vicprezidanto : Stefan MacGill, Zsókavár ut. 46 IX 36, H-1157 Budapest; tel. (1) 560-244 (nur por lasi mesaĝon) — Internaciaj ekzamenoj kaj iliaj kursoj, statistikado de instruado, internaciaj lerniloj, lerneja projekto, IPR.

Ĝen. Sekretario : Audrey Childs-Mee, Postbus 25041, NL-3001 HA Rotterdam; tel. (010)425.4625 — Rilatoj kun sekcioj, membroj kaj kun UEA. Internaciaj korespondaj kursoj. Pedagogia prizorgo de infanaj kongresetoj de UEA.

Kasisto : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby; tel. (0415)-501 52 — Financaj rilatoj kun sekcioj, konferenco, k.a.

Vicsekretario : Malcolm Jones, 41 Causeway, GB-SN 15 3DD Chippenham; tel. (0249) 656041 — Venonta konferenco, lernejana korespondado, unuecigo de naciaj ekzamen-sistemoj.

Membroj : Till Dahlenburg, Str. der DSF 13, DDR-2722 Brüel; tel. (09-8576)-528 — Gvido de pedagogia komisiono, internaciaj ekzamenoj, metodikaj kursoj.

Zang Danchen, Gong Wai Xi, Shifan Daxue, Wuhan, Huazhong, Ĉinio — Evoluo kaj fondo de sekcioj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko.

Jarkolekto 19 **apr.-jun. 1989** **N-ro 2, 1989**

«Internacia Pedagogia Revuo» estas sendependa forumo de la tutmonda pedagogaro. Ĝi aperas kvarfoje jare. La redakta komitato rajtigas sin mallongigi aŭ korekti la manuskriptojn nur laŭ lingvaj vidpunktoj. Manuskriptojn ni ne resendas. Reproduktaĵoj, tradukaĵoj estas permesataj, eĉ rekomendataj, kune kun fontindiko.

EL LA ILEI-HISTORIO

Kvinlanda Pedagogia-Didaktika Eksperimento

KOVÁCS Márta

La ideo instrui Esperanton kiel unuan fremdan lingvon leviĝis jam komence de la dudekaj jaroj. Ĝis la sesdekaj jaroj elformiĝis la teorio, laŭ kiu la instruado de Esperanto kiel unua fremda lingvo donas pli da rezultoj ol tio de iu ajn alia nacia lingvo; ĝi plifaciligas la alproprigon de pluaj fremdaj lingvoj; ĝi helpas pli profunde kompreni la strukturon de la gepatra lingvo; ĝi plibonigas la rezultojn de instruado ĉe aliaj studobjektoj (ekz. geografio, historio); ĝi edukas je estimo de kulturo kaj moroj de aliaj popoloj, je internacia kunlaboro. (2-a Internacia Lerneja Konferenco, Graz 1966.)

Por pruvi la suprajn hipotezojn ILEI iniciatis grandskalan eksperimentadon dum la 60-70-aj jaroj. (Fine de la 70-aj jaroj la *Institut für Kybernetische Pädagogik* en Paderborno daŭrigis la eksperimentojn.)

La eksperimentoj de ILEI estis organizitaj en du regionoj. Tiu ĉi studaĵo prezentos tiun de la unua regiono.

La eksperimento en la dua regiono okazis en 1975-77 kun partopreno de kvar Okcident-Eŭropaj landoj. La priskribo de la eksperimento troviĝas en la libro de Helmut SONNABEND *Esperanto: lerneja eksperimento - raporto, analizo, konkludo* (Edistudio 1979).

PDE kaj ĝiaj hipotezoj

Dum la III-a Kunordiga Konferenco de ILEI en 1970 reprezentantoj (oficialaj delegitoj de klerigaj kaj edukaj ministerioj kaj esperantistaj fakuloj) el kvin landoj interkonsentis fari trijaran eksperimenton. La fakan gvidon de tiu

Pedagogia-Didaktika Eksperimento (PDE) oni komisiis al la tiama estro de la Esperanto-fako en Universitato Eötvös Loránd de Budapest, profesoro SZERDAHELYI István.

La eksperimento okazis inter 1971-74, estus partoprenintaj ĝin kvin landoj (pro kio la nomo *kvinlanda*): Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio, Jugoslavio – kun entute lernantoj de 30 klasoj. (Pro rezigno de Aŭstrio la nombro de landoj malkreskis ĝis kvar, sed la lernantoj el Jugoslavio havis gepatrolingvon aŭ la slovenan aŭ la serbo-kroatan, tiel oni havis daŭre kvin diverslingvajn grupojn.)

La celo de PDE estis pruvi la subajn hipotezojn:

1. Esperanto estas pli facile alproprigebla ol iu ajn alia lingvo inter la cirkonstancoj de kutima lerneja instruado;
2. Esperanto helpas la alproprigon de la poste aŭ paralele instruata fremda lingvo;
3. Esperanto kontribuas al la formigo de klaraj lingvaj nocioj kaj per tio helpas la pli ĝustan komprenon de la gepatra lingvo;
4. Esperanto, estante internacia kaj neŭtrala, enhavas bone ekspluateblajn valorajn pedagogiajn kvalitojn;
5. Jam dum ĝia instruado ĝi estas vaste kaj pli intensive kaj varie aplikebla praktike.

Komence de la eksperimento la meza aĝo de la lernantoj estis 11 jaroj. La instruado efektiviĝis laŭ la samaj instruplanoj kaj lernolibro. Fine de ĉiu jaro okazis kontrolo kaj en la eksperimentaj kaj en la kontrolaj klasoj.

La kontroloj de la unuaj du jaroj ekzamenis la unuan hipotezon; en la tria jaro ĝi celis pruvi la punktojn 1,2, kaj 3; la 4-a kaj 5-a hipotezoj estis kontrolitaj en la posteksperimenta Internacia Tendara Lernejo. Je statistika analizo baziĝas la pruvo de la unuaj tri hipotezoj.

La kontrolaj taskoj kaj taksadoj

1-a kontrolo: a) skribi vortojn dum 10 minutoj
b) priskribo de tri simplaj bildoj

2-a kontrolo: a) priskribo de 12 simplaj bildoj per sintagmoj (numeralo + adjektivo + subsantivo)
b) priskribo per unu frazo de 6 bildetoj
c) priskribo per du frazoj de 3 bildetoj
d) per substantivoj nomi 12 korpopartojn kaj membrojn de familio

3-a kontrolo: "Tiel pasigis mia familio la pasintan dimanĉon" - libera konceptaĵo dum 45 minutoj. La lernantoj en la eksperimentaj klasoj skribis pri la temo en Esperanto, gepatrolingve kaj en la alia fremda lingvo lernata de ili; la lernantoj de la kontrolaj klasoj skribis ĝin same gepatrolingve kaj en la lernata fremda lingvo.

La taksado okazis laŭ kvantaj kaj kvalitaj kriterioj: kiom da vortoj estis skribitaj, kiom longaj estas la frazoj (kaj la teksto mem); respektive kiomgrade estis senerara la kontrolaĵo. Por kune apliki tiujn kriteriojn la prilaborantoj de ĉiu kontrolo esprimis la taksadon ankaŭ per t.n. sukceskoeficiento. (La skribigo de la kontrolo kaj la korektado estis la tasko de la E-instruistoj partoprenantaj la eksperimenton, la sumigo kaj analizo de la rezultoj troviĝas en kelkaj diplomlaboraĵoj de studentoj de profesoro SZERDAHELYI.

Rezultoj por pruvi la unuan hipotezon

La meza poenta valoro de la 1-a kaj 2-a kontroloj el Esperanto superas la fremdlingvajn ĉe ĉiuj taskoj. Ekzemple fine de la dua jaro:


	poentoj
angla	129,54
germana	103,25
itala	138,35
rusa	190,07
- - - - - - - - - - - - - - - - - - - -	
fremdaj lingvoj meze	134,13
Esperanto	178,26

La sukceskoeficienton post la tria jaro vidu sur la *1-a figuro.*

(La formulo de la sukceskoeficiento estas: (0,02A + 1 - B + 3 - 3C)D
kie A: vortoj/frazoj
B: eraraj frazoj/entutaj frazoj
C: eraraj vortoj/entutaj vortoj
D: la sumo de vortoj

Notindas, ke la relativa diverĝo de la Esperanto-mezo estas forta, tio de la fremdaj lingvoj eĉ ekstrema; – malgranda aŭ meza relativa diverĝo troveblas nur en kelkaj klasoj kaj ĉefe ĉe gepatraj lingvoj.)

Figuro unu



Rezultoj por pruvi la duan hipotezon


La statistika priskribo konsistas parte el la komparo de la rezultoj de eksperimentaj kaj kontrolaj klasoj. Uzebla materialo estas je dispono el tri landoj.

	Bulgario	Hungario	Serbio
la alia fremda lingvo de la eksperimenta klaso	rusa (15 lernantoj)	rusa (13 lernantoj)	angla (14 lernantoj)
la fremda lingvo lernata en la kontrola klaso	rusa (15 lernantoj)	rusa (13 lernantoj)	angla (19 lernantoj)

La 2-a figuro montras la kvantajn kaj kvalitajn rezultojn de frazoj:

La horizontala akso indikas la mezan nombron de frazoj, la vertikala la proporcion de eraraj kaj seneraraj frazoj. La meza rezulto de la tri klasoj montras, ke la fremdlingvaj laboraĵoj de la kontrolaj klasoj havas malpli da

Figuro du



frazoj, kaj samtempe ili estas la plej eraraj; pli rezultaj estas la fremdlingvaj "verkoj" de la eksperimentaj klasoj. La esperantlingvaj tekstoj estas pli longaj kaj malpli eraraj; plej bone sukcesis la gepatro-lingvaj laboraĵoj de la eksperimentaj klasoj. Similan rezulton donis la komparo je nivelo de vortoj kaj vortkategorioj.

Alia maniero de la statistika analizo estas desegni punktdiagramon de la sukceskoeficento por Esperanto kaj por la alia fremda lingvo laŭklase kaj kalkuli la regresan koeficienton.

La komparo baziĝas je rezultoj de 9 klasoj. La influo de Esperanto je la alia fremda lingvo estas 55 %-e signifa.

La *3-a figuro* prezentas la regresan fukcion de unu signifrezulta kroata kaj unu nesignifrezulta hungara klasoj. (Vertikala akso: sukceskoeficiento de Esperanto, horizontala akso, tio de la fremda lingvo; **r**: korelativa koeficiento, kies rezultoj montras interrilatan forton se **r** estas pli ol 0,75, mezan se inter 0,75 kaj 0,5 kaj malfortan se malpli ol 0,5. Se temas pri kaŭzeco, la kvadrato de la korelativa koeficiento montras en procentoj, kiomgrade la nedependa variablo influas la dependan variablon.)

Fake akceptita fakto estas, ke la lernado de iu fremda lingvo helpas la alproprigon de la lernotaj lingvoj. Laŭ la supraj rezultoj tio validas ankaŭ por Esperanto.

Tamen, restas nerespondita la grava demando: ĉu Esperanto donas **pli efikan** apogon en la lernado de la dua fremda lingvo ol iu ajn alia etna lingvo? La rezultoj de PDE estus multe pli informriĉaj, se oni povus kompari ilin kun la rezultoj de aliaj eksperimentoj, kie la propedeŭtika lingvo estis ne Esperanto, sed iu alia lingvo. Bedaŭrinde tiuspecan komparon ne eblis fari pro manko de indikoj.


Rezultoj por pruvi la trian hipotezon

La rezultoj ĉerpitaj laŭ la prezentitaj kvantaj kaj kvalitaj kriterioj estas tre malsimilaj, neĝeneraligeblaj. Stilistika analizo de la laboraĵoj tre verŝajne rezultus same (la lernantoj ne speciale entuziasmiĝis pro la donita temo). Koncerne la trian hipotezon eble kun gepatrolingva gramatika kontrolo la eksperimento havus pli fidindan rezulton.

* * *

Tiu PDE – krom la metodikaj spertoj – statistike pruvis la hipotezon laŭ kiu Esperanto estas pli sukcese alproprigebla ol la parelele lernata alia fremda lingvo; donis informajn indikojn pri la propedeŭtika valoro de Esperanto kaj

Figuro tri



pri ĝia influo je la konsciiĝo de lernantoj en ilia gepatra lingvo. Tiuj lastaj indikoj estas nur informaj, ĉar unuflanke la specimeno malgrandiĝis ĝis la tria jaro de la eksperimento. Tio precipe dubindigas la rezultojn, se oni celas baze de la leĝo de grandaj ciferoj ekvilibri la efikon de la gepatra lingvo. (Ekz. estas komparataj Esperanto- kaj ruslingvaj laboraĵoj de bulgaraj kaj hungaraj lernantoj respektive esperantlingvaj konceptaĵoj de italaj geknaboj.) Aliflanke, la gradon de la influo de Esperanto je la gepatra lingvo ne eblis konstati pro netaŭgeco de la tasko-tipo en la kontrolo.

Laŭ la spertoj de PDE estus dezirinde organizi novan – internacian aŭ enlandan – eksperimenton por fidinde pruvi la duan kaj trian hipotezojn.

Laŭ la diplomlaboraĵo de la aŭtoro
ĉe la Budapeŝta Universitato ELTE (1981)

La dudekkvinjara historio de la Esperanto-fako de ELTE naskis ĉ. 100 diplomigajn disertaciojn, el kiuj nur kelkaj estas listigitaj en la superrigardo kompilita de s-ro E. Symoens. La redaktoro de IPR (finstudinto de la fako) nun klopodas inventari kaj katalogi ĉiujn el tiuj disertacioj.

PRI KELKAJ FAKVORTOJ EL LA SFERO "UNIVERSITATA MEDIO"

Sabine FIEDLER

IPR okt.-dec. 1988 (p. 18) informis pri internacia lernolibro de E-o por studentoj kaj sciencistoj. Tia lernolibro, temanta pri universitata instruado kaj studenta vivo, neeviteble inkluzivas bazajn fakvortojn el la sfero "universitata medio", kiu internacie montras plej grandan malkonformecon. Oni pensu nur pri la diversaj nomoj por institucioj de instruado aŭ pri la diferenca valoro, kiun ekzemple la doktora titolo posedas en la diversaj landoj. Ĝenerale, pedagogio, al kiu ankaŭ la sfero "universitata medio" apartenas, estas scienco kun nesufiĉe evoluinta terminologio. Sekve por la aŭtoroj de lernolibro destinita por internacia uzado necesas okupiĝi pri la universitataj sistemoj ne nur de la hejmlando, sed ankaŭ pri tiuj de la aliaj ŝtatoj por trovi ĝeneralajn nomojn internacie kompreneblajn kaj akcepteblajn. Interŝanĝo de opinioj pri esprimoj inter fakuloj el la plej diversaj landoj estus profitiga. Al ĝi celas la sekvonta tabelo de fakvortoj el la universitata medio. Pro la deziro sistemigi ilin la nomoj estas dividitaj laŭ temaj grupoj kaj – kie tio ŝajnas necesa – klarigitaj per difino kaj ekzemplo montrantaj la sencon, en kiu ni uzis ilin en la lernolibro. Krome la tabelo enhavas ekvivalentojn en germana kaj angla lingvoj. Ni petas ĉiujn kolegojn subteni nian laboron kaj sendi opiniojn pri la uzitaj E-lingvaj terminoj aŭ aldonajn proponojn al la adreso de la aŭtorino fine de tiu ĉi artikolo. Dezirindaj estus ankaŭ ideoj pri la esprimoj en la germana k aj angla lingvoj, kiujn ni elektis laŭ niaj spertoj kaj konataj vortaroj.

1.Institucioj de instruado

1.1 *bebovartejo* (g. Kinderkrippe, a. crèche/day-nursery)
Loko, kie malgrandaj infanoj estas gardataj kaj prizorgataj (dum la labortempo de siaj gepatroj) de speciale trejnitaj flegistinoj antaŭ ol ili vizitadas infanĝardenon.

1.2 *infanĝardeno* (g. Kindergarten, a. nursery school/kindergarten)
Loko, kie infanoj estas prizorgataj kaj instruataj per edukaj ludoj (dum la labortempo de la gepatroj) antaŭ ol ili vizitadas lernejon.

1.3 *lernejo, elementa l., supera l.* (g. Schule, Unterstufe, Oberstufe; a. school, primary sch., secondary sch.)
Loko, kie okazas organizita instruado por infanoj kaj junuloj. La unuaj lernejjaroj povas esti nomataj 'elementa l.', la postaj 'supera l.'.
Ekz.: En tiu lando infanoj iras lernejon ekde la 6-a jaro.

1.4 *universitato* (g. Universitaet, a. university)
Loko de supera instruado, kie oni esploras kaj instruas diversajn branĉojn de sciencoj kaj artoj kaj aljuĝas titolojn.

1.5 *altlernejo* (g. Hochschule, a. college)
Loko de supera instruado simila al universitato. Sed, diference de tiu, altlernejo sin specialigis en la instruado de unu aŭ kelkaj fakoj.
Ekz.: altlernejo pri sporto, pri pedagogio

2. Personoj laborantaj en universitato/altlernejo

2.1 *studento* (g. Student, a. student)
Persono lernanta ĉe u./a.
2.1.1. *kunstudento* (g. Kommilitone, a. fellow-student)
Kamarado ĉe u./a.
2.1.2. *rekta studento* (g. Direktstudent, a. full-time student)
Persono, kies ĉefa okupo estas studado ĉe u./a. kaj kiu dum tiu tempo ne praktikas sian profesion.
2.1.3. *telestudento* (g. Fernstudent, a. part-time student)
Persono, kiu studas ĉe u./a. sen interrompi sian profesian laboron. Ŝi/li okupiĝas pri studmaterialoj dum sia libera tempo kaj specialaj periodoj destinitaj por tio kaj havas kontakton kun la u./a. ĉefe koresponde.

2.2. *finstudinto* (g. Absolvent, a. graduate)
Persono, kiu sukcese finis studadon ĉe u./a. kaj de tiu ricevis diplomon.

2.3. *universitata instruisto* (g. Hochschullehrer, a. university teacher)
Persono, kiu laboras en u./a. instruante studentojn. Laŭ oficoj kaj kvalifikoj ŝi/li rajtas havi titolojn kiel ekz. tiun de doktoro, lektoro, docento, profesoro.
2.3.1. *gvidanta instruisto* (g. Betreuer, a. tutor)
Universitata instruisto, kiu gvidas la studadon de kelkaj studentoj/de studenta grupo.

2.4. titoloj: *doktoro, lektoro, docento, profesoro*
Vidu 2.3.!

2.5. *dekano* (g. Dekan, a. dean)
Estro de fakultato (vidu 3.1.)

2.6. *sekciestro* (g. Sektionsdirektor, a. head of department
Estro/gvidanto de sekcio

2.7. *rektoro* (g. Rektor, a. rector/Vice-Chancellor)
Ĉefo de u./a.

2.8. *mentoro* (g. Mentor, a. mentor)
Konsilanto kaj gvidanto de studento ekz. dum ties scienca laboro aŭ staĝo.

3. Organizaj formoj ĉe u./a.

3.1. *fakultato* (g. Fakultaet, a. faculty)
Dividaĵo laŭ fako(j) ĉe u./a.
Ekz.: fakultato pri juro, pri natursciencoj
F. povas esti subdividita en sekciojn (vidu 3.2)

3.2. *sekcio* (g. Sektion/Abteilung, a. department)
Subdividaĵo de fakultato aŭ dividaĵo en u./a. laŭ fako, kiu ne havas sufiĉe grandan gravecon por postuli la rangon de fakultato.
Ekz.: Mi estas studento de la fakultato pri fiziko, al kiu apartenas ekzemple la sekcioj pri teoria fiziko kaj eksperimenta fiziko. Sekcio pri sporto.

3.3. *studofako* (g. Studienrichtung, a. branch of study)
Branĉo de scienco aŭ arto, pri kiu studento ĉefe okupiĝas kaj pri kiu li fariĝas specialisto per sia studado. (Vidu ankaŭ 3.4)

3.4. *studobjekto* (g. Studienfach, a. subject of study)
Programero, pri kiu studento okupiĝas dum sia studado. Ekzistas devigaj kaj nedevigaj studobjektoj.
Ekz.: Mia studofako estas fiziko; kiel studento de fiziko mi okupiĝas pri diversaj studobjektoj, ekz. pri matematiko, komputiko kaj sporto.

3.5. *studojaro* (g. Studienjahr, a. academic year)

Periodo, en kiun studado estas dividita. Unu studojaro konsistas el pluraj semestroj.

Ekz.: Studado pri medicino konsistas el 6 studojaroj. La studentoj de la unua studojaro renkontiĝas en la granda aŭditorio.

3.6. *semestro* (g. Semester, a. term)
Vidu 3.5.

3.7. *ekzameno* (g. Prüfung, a. examination)
Kontrolo de la scioj de studentoj; okazas skribaj kaj parolaj ekzamenoj.

3.8. *lekcio* (g. Vorlesung, a. lecture)
Scienc-instrua parolado en u./a.
Ekz.: Lekcio pri psikologio de d-ro...

3.9. *seminario* (g. Seminar, a. seminar/tutorial group)
Formo de instruado en u./a., kiu okazas en malgrandaj grupoj kaj inkluzivas diskutojn.

3.10. *staĝo* (g. Praktikum, a. practical period/course)
Periodo, dum kiu studento ricevas trejnadon en nova medio kja samtempe povas apliki praktike la scion akiritan dum studado.

3.11. *individua studado* (g. Selbststudium, a. independent study)
Periodo de studado, dum kiu studento akiras scion per memstara tralaborado de libroj kaj aliaj studmaterialoj.

3.12. *studotasko* (g. Studienaufgabe,a. study task)
Laboro donita de instruisto al studento, farota de tiu en difinita tempo.

3.13. *studenta grupo* (g. Seminargruppe, a. students' group)
Aro da studentoj de la sama studofako kaj -jaro, kiuj estas kunigitaj pro diversaj kaŭzoj (ekz. pro la sama nivelo).

4. Okupoj antaŭ, dum kaj post studado

– informi sin pri enirkondiĉoj (en universitaton)
– trapasi eniran ekzamenon
– enmatrikuligi/elmatrikuligi studentojn
– ricevi stipendion

– aŭskulti lekciojn
– partopreni seminariojn
– sukcesi/malsukcesi (fiaski) en ekzameno
– (fin)skribi kaj defendi disertacion
– fari esplorlaboron
– doktoriĝi pri...
– demandi/aspiri pri laboro/ofico

5. Lokoj kaj okazaĵoj de universitata vivo

5.1. *universitata tereno* (g. Universitaetsgelaende, a. campus)
Loko, kie koncentriĝas konstruaĵoj apartenantaj al u./a., kiel ekz. universitata biblioteko, studenta gastejo, aŭditorioj.

5.2. *studenta gastejo* (g. Mensa, a. refectory)
Manĝejo aŭ restoracio, kie studentoj ricevas malmultekostan tagmanĝon.

5.3. *universitata biblioteko* (g. Universitaetsbibliothek, a. university library)
1. Kolektaĵo de libroj, ĵurnaloj kaj aliaj presitaj materialoj, aĉetitaj kaj adminsitrataj de u./a.
2. Konstruaĵo, kie tiu kolektaĵo troviĝas.
5.3.1. legejo (g. Lesesaal, a. reading room)
Ĉambrego en biblioteko, kie studentoj aŭ aliaj personoj sidas kaj legas librojn ktp. de tiu biblioteko.
5.3.2. katalogejo (g. Katalogsaal, a. catalogue room)
Ĉambrego en biblioteko, kie troviĝas katalogo(j). (Katalogo en biblioteko estas meblaĵo kun tirkestoj, en kiuj troviĝas slipoj aŭ kartetoj informantaj pri la libroj ktp., kiujn la biblioteko posedas. Ĝi estas ordigita laŭ difinita ordo, ekz. laŭ alfabeto)

5.4. *studenta hejmo* (g. Studentenwohnheim/Internat, a. students' hostel)
Domo (apartenanta al u./a.) destinita por studentoj, kiu servas al ili kvazaŭ hejmo/restadejo.

5.5. *aŭditorio* (g. Hörsaal/Auditorium, a. lecture hall)
Ĉambrego, en kiu okazas lekcioj.

5.6. *montofesto* (g. Bergfest, a. ?)
Solenaĵo, kiun studentoj celebras post kiam la unua duono de ilia studado finiĝis.

6. **Laboro en universitata biblioteko**
– uzi (sisteman/alfabetan) katalogon
– montri la membrokarton
– pruntepreni librojn
– redoni librojn
– mendi librojn
– plenigi pruntilon (t. e. enskribi la nomon de aŭtoro, titolon, eldonjaron kaj -lokon, klasifikan indikaĵon)

Noto: Komparu IPR jul.-sept. 1988 p. 3-8

Atentiginte pri tiu artikolo mi samtempe volas korekti ĝin. Bedaŭrinde okazis preseraro, kiu malĝustigas la enhavon. La dua alineo devas finiĝi per la parentezo "...(ekz. la teatra pedagogio, agrikultura pedagogio)". Post tiu sekvas jena nova alineo (kiu tute mankas):

"Ni krome ne forgesu, ke la pedagogio kunlaboras kun aliaj sciencoj, uzante konojn kaj metodojn de ili, kio kaŭzas la estiĝom de limsciencoj (ekz. la pedagogia psikologio, pedagogia ekonomio, pedagogia sociologio)."

Sabine FIEDLER, Riesaer Str.5, Leipzig, 7050,
Germana Demokratia Respubliko

EKZAMENA GVIDILO

Paralele kun ĉi tiu dua numero de IPR pretiĝas en Budapeŝto same ampleksa libreto, kiu prezentas la historion, celaron, postulojn kaj regularon de la Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI je elementa kaj meza niveloj. Ĝi krome prezentas du specimenajn ekzamenojn — unu elementan kaj unu mezan. La libreto estas pretigata por lanĉado dum la Universala Kongreso de UEA en Brajtono, Britio, kie kompreneble la ekzamenoj mem estos ankaŭ ofertataj. La prezo estas anoncota en la sekva IPR.

La ekzamenoj estos unuafoje proponitaj al juna publiko en la Internacia Junulara Kongreso en Nederlando, kaj al amerika publiko en la somera sesio de la San-franciska Ŝtata Universitato.

LA SUFIKSO -IĜ- ĈE APLIKO AL VERBOJ

FÉLIX GARCÍA BLÁZQUEZ

La aplikado de la sufikso **iĝi** en la derivado de vortoj konstituis, ekde la komenca etapo de la vivo de E-o, unu el la tiomo da malfaciloj, kiuj prezentiĝis al la adeptoj en la studo kaj praktiko de la lingvo.

En la nuna artikolo ni pritraktos tion, kio koncernas la aplikadon de tiu sufikso al la verboj; tamen pro la amplekso kaj komplikaĵoj de la temo, ni enlimigos ĝin al la transitivaj verboj.

La Fundamento ne tuŝas specife tiun temon en la Gramatiko: ĝi nur liveras kelkajn ekzemplojn en la Ekzercaro, kaj en la Universala Vortaro ĝi iel klarigas al ni la signifon de la sufikso. En tiu vortaro, **iĝi** oni tradukas per "se faire, devenir, F; to become, A", t. e., ĝi signifas ian ŝanĝon en la ento aŭ en ties kvalito indikita per la radiko. En la ekzemploj trovataj en tiu vortaro ne aperas ia apliko al transitiva verbo. En tiu ero la klarigo ne estas kompleta, ĉar ne estas koncepteble, ke la ento, kiun reprezentas la subjekto, povus transformiĝi en agon aŭ fenomenon, kiun siavice reprezentas la verbo.

Ni vidu, kiuj estas la klarigaj ekzemploj troveblaj en la Ekzercaro:

40. "Kiam vi ekparolis, ni atendis aŭdi ion novan, sed baldaŭ ni vidis, ke ni trompiĝis."

Analizante la kuntekston de tiu ekzemplo, ni konkludas, ke la subjekto pasas de iu stato de kredemeco al tiu de seniluziiĝo pro la fakto, ke la oratoro nenion novan diris. Sekve, tiu ŝanĝo havas kaŭzon eksteran rilate al la subjekto.

41. "Li estas tre tolerema kaj ekscitiĝas ofte ĉe la plej malgranda bagatelo".

Ĉi tie okazis ia ŝanĝo ekde trankvileco al ekscitiĝo, kaj la ŝajna ekstera kaŭzo estis "la plej malgranda bagatelo".

Oni rimarku, ke en ambaŭ ekzemploj la kaŭzo de la ŝanĝo estas ekstera al la subjekto, aŭ, pli ekzakte, al la ento reprezentata de la subjekto.

En Lingvaj Respondoj, Zamenhof ne tuŝis aparte tiun temon, kvankam li rekonis, ke por alitipaj verboj estas dubinda la uzo de **iĝi** kiel sufikso de reflekSiveco (ekz. *sidiĝu* por **sidigu vin**).

Ni vidu do, kion diras tiurilate aliaj aŭtoroj:

Szerdahelyi

El la ekzemploj prezentitaj en lia elementa lernolibro oni povas konkludi, ke **iĝi** aplike al transitiva verbo naskas simplan pasivan verbon, sed sen esprimo de la aganto en ties kunteksto. Tra la malmultaj ekzemploj de la leciono videblas, ke la subjektoj estas neanimitaj estaĵoj. En alia parto de la libro la aŭtoro, pere de grafika simbolo, aljuĝas al **iĝi** refleksivan signifon, sen doni ekzemplojn.

De Diego

Akceptas la refleksivan signifon de la sufikso **iĝi**, sed li kliniĝas por la pronoma refleksivo, kiam oni volas subkomprenigi, ke intervenas nur la volo de la subjekto. Kvankam ĉi tiu aŭtoro liveras ekzemplojn kun **iĝi** tradukitajn hispanen en sia metodo per la refleksiva pasivo, li ne egaligas tiun uzon al la pasivo.

Waringhien

En Plena Ilustrita Vortaro ni trovas la jenan k arigon: "kun tr-aj verboj **iĝ** subkomprenigas ĉiam antaŭ si la participan sufikson **-ata** (aŭ **-ita**)". Pli malsupre PIV asertas: "Kiel oni ĵus vidis, la **iĝ**-verboj estas iafoje uzataj kun la senco de pasiva verbo..." Tio estas logika konkludo de tio, kion li diris antaŭe, kvankam la adverbo "iafoje" ne estas ekzakta. Sed ankoraŭ pli malsupre oni povas legi: "ĉe la **iĝ**-verboj la subjekto kaj la aganto estas identaj, do kroma aganto ne estas subkomprenata..." Evidente, li aludas refleksivecon. Tiu aserto ja surprizegas nin, ĉar unue li diris, ke la verboj kun **iĝ** indikas pasivecon, kaj poste li implicite deklaras, ke ili indikas refleksivecon, sed... inter pasiveco kaj refleksiveco estas granda diferenco!

Sekve, la reguloj, kiel supre formulitaj, rezultas konfuzaj kaj kontraŭdiraj, ne meritante esti instruataj en perfektigaj kursoj, precipe, se ties partoprenantoj estas kleraj personoj, ĉar la instruanto troviĝos nepre en kompromita situacio post iliaj demandoj antaŭ la senlogikeco de tiuj reguloj. Laŭ tio, kion ni vidis, rezultas nepre necese realigi zorgeman esploron pri la klasika kaj nuntempa lingvouzoj, celante liveri al la studemuloj klaran kaj koheran klarigon pri la uzo de tiu gravega sukfikso.

La unua, t. e. la klasika, estos fragmenta de teksto de Zamenhof mem, kaj por la aktuala ni elektis ekstrakton de jara raporto de UEA, supozeble redaktita aŭ almenaŭ sub la respondeco de kleraj esperantistoj, kiaj ĝenerale estas ties estraranoj. Ni enlimigos la kompilotajn ekzemplojn al la apliko de la sufikso **iĝ** al transitivaj verboj kun infinitivaj kaj aliaj finaĵoj, sen konsideri la derivaĵojn substantivajn, adjektivajn aŭ adverbajn.

Antaŭparolo al la "Unua Libro"
(p. 228 kaj sekvaj de la Fundamenta Krestomatio)

1. "ni ordinare ne havas la eblon kompreniĝadi kun similaj al ni homoj"

Ĉi tie la funkcio de **iĝi** estas tiu de reciproka ago emfazita per la prepozicio "kun".

2. "la legataĵo fariĝus komuna por ĉiuj homoj"

Ĉi tie ne ekzistas refleksiveco, ĉar la legataĵo ne havas volon pro esti neanimita estaĵo. Ankaŭ ne ekzistas reciprokeco, ĉar la legataĵo ne povas agi propravole sur aliajn entojn. La teksto, do, egalvaloras al "la legataĵo estus farata komuna por ĉiuj homoj".

3. "la lingvo mem povus pli ellaboriĝadi"

Ĉar la lingvo en si mem ne posedas volon, la senco ne povas esti alia ol pasiva.

4. "sur kiu parto de la tera globo ili naskiĝis"

Kiam iu naskiĝas, tiu estas infano, kaj en tiu etapo de la vivo ĝi ne havas volon nek kapablon agi. Do, la senco estas nepre pasiva.

5. "kun kiu oni povas kompreniĝi per tiuj ĉi lingvoj"

Same al la ekzemplo 1, ĉar ekzistas reciprokeco indikata per la prepozicio "kun".

6. "ĉiu el la ekzistantaj lingvoj povus fariĝi tutmonda laŭ la deziroj de ĉiu aparta persono"

Egale al la ekzemplo 3. Laŭ la kunteksto la aganto estas "ĉiu aparta persono".

7. "(la lingvo) montriĝis malvive naskita"

Same al la ekzemplo 3. La kunteksto ne indikas la aganton. Pli logike ŝajnas konsideri "montriĝi" kiel sinonimon de **aperi, aspekti.**

8. "ĝi (malvarma, indiferenta mondo) povu komunikiĝadi kun tiuj ĉi nemultaj"

Reciproka signifo.

9. "ia alkonduko de ĉiu objekto el la formoj komplikitaj el kiuj ili naskiĝis al la formoj plej facilaj – prezentas la plej malfacilan"

Same al la ekzemplo 4.

10. "Ĉiuj vortoj kiuj jam fariĝis internaciaj"

Same al la ekzemploj 2 kaj 6.

Resume:

Pasivaj uzoj de **iĝ** (neanimitaj subjektoj) Ekz. 2,3,6,7,10.

Pasivaj uzoj de **iĝ** (animitaj subjektoj) Ekz. 4,9.

Estrara raporto de UEA - 1987
(p. 101-103, Esperanto junio 1988)

1. "montriĝis maleble limiĝi nur al tio"
Simile al la ekzemplo 7 de Zamenhof. Ĉi-kaze la subjekto estas "limiĝi nur al tio".

2. "Elektiĝis kvar novaj membroj"
Evidente ne temas pri refleksiva ago. Tamen ekzistas volo de ambaŭ flankoj, tiom de la elektitoj kiom de la elektintoj.

3. "En Varsovio elektiĝis G. C. Fighiera, kiu tamen neniam vere instaliĝis antaŭ ol anonci jarfine sian eksiĝon"
Laŭ la kunteksto "elektiĝis" estas pasiva verbo, neniel refleksiva, kaj "instaliĝis" estas pure refleksiva.

4."kompara statistiko troviĝas en la revuo Esperanto"
Evidente, pasiva signifo (ĉi-kaze la formo "trovas sin", kvankam fundamenta, ne estas rekomendinda, ĉar la subjekto "statistiko" ne kapablas trovi ion, en strikta senco).

5. "La sumo de la delegitecoj...distribuiĝis jene"
Temas nediskuteble pri pasiva ago.

6. "...prezentiĝis "Historio de Esperanto en datoj"..."
Denove la subjekto estas neanimita ento, do la signifo estas pasiva.

7. "sanĝiĝis ĉefdelegito en Brazilo..."
Ekzistas volo ambaŭflanke, kaj de la ŝanĝito, kaj de la ŝanĝinto. Do, rilate al refleksiveco-pasiveco la senco estas hibrida.

8. "...negativa saldo ne fariĝis pli alta..."
Temas pri pasiva signifo.

9. "...tra 1987 solviĝis almenaŭ du grandaj malnovaj ŝuldoj..."
La subjekto ne estas persono, do la signifo estas pasiva.

10. "la komitato esprimiĝis pri ĝi (la buĝeto)"
Tiu uzo estas nek refleksiva nek pasiva nek reciproka. Ĝi similas al arkaika uzo de la sufikso **iĝ** kun aktiva signifo. Alia ekzempo simila, prenita el la Fundamenta Krestomatio (p. 140):

Kial ŝi ne decidiĝas paroli?

kie ne estas rimarkebla diferenco kun la simpla "decidas".

Resume:

Pasivaj uzoj de **iĝ** en neanimitaj subjektoj: 1, 4, 5, 6, 8, 9.

Pasivaj uzoj de **iĝ** en animitaj subjektoj: 2,3.

Sen konsidero al la kvantoj, ni vidu la diferencajn uzojn de **iĝ** laŭ ĉu la subjekto reprezentas *a,* neanimitajn aŭ *b,* animitajn estaĵojn.

a, Tiom en la klasikaj ekzemploj kiom en la modernaj, je apliko de **iĝ** al transivitaj verboj kies subjektoj reprezentas neanimitajn entojn, **nedisputeble** la rezultanta signifo estas pure pasiva. Kompreneble, el tiuj ekzemploj ni devas ekskludi eventualajn uzojn metaforajn. Ekz.

La luno kaŝiĝas trans la nuboj.

b, Kontraŭe, kiam temas pri neanimitaj entoj, la situacio iĝas iomete kompleksa.

b-1, La zamenhofaj ekzemploj 1,5,8 montras al ni reciprokan signifon.

b-2, En ekzemploj de aliaj klasikaj aŭtoroj oni povas trovi refleksivan signifon de tiu sufikso kaj eble kun pli alta procentaĵo. Tamen paralele al tiu uzado ekzistas alia tendenco, kiu preferas ne apliki la sufikson kaj uzi nur la koncernajn refleksivajn pronomojn.

b-3, En la nuntempo, krom la refleksiva kaj reciproka uzoj prezentiĝas la pasiva, kiel oni vidis en la ekzemploj 2 kaj 3 de la UEA-raporto.

b-4, Fine, por kompletigi la kompleksecon de tiu panoramo, oni devas mencii la aktivan signifon de tiu sufikso, kiel en la 10-a ekzemplo de la raporto.

Resumo

En la nuna stato de la evoluo de E-o la sufikso **iĝ** en apliko al transitivaj verboj donas

1 – pasivan signifon al la rezultanta verbo, preskaŭ ĉiam sen esprimo de la aganto en la kunteksto.

2 – refleksivan signifon, kiam temas pri animitaj subjektoj.

3 – ĉe animitaj entoj, ankaŭ reciprokan signifon.

4 – aktivan signifon, precipe en arkaismaj uzoj.

Tiuj estas la faktoj. Pri la (ne)korekteco aŭ (ne)rekomendindeco nenio estas dirita ĝis nun. Tamen decas demandi al si, ĉu estas dezirinde, ke en racia lingvo, kia estas aŭ devas esti E-o, ekzistu tiom da signifoj por iu sufikso?

Ni studu do ekde strikte logika vidpunkto, kiu el tiuj 4 ebloj devos havi superregon super la ceteraj, sen eniri por la momento didaktikajn konsiderojn. Por la nuna analizo ni ekzamenos iujn ekzemplojn kun **igi** (ĝia frato-sufikso) en apliko al diversaj vortspecoj primitivaj – algluite al la diverskategoriaj radikoj, kiel dirus la Akademio –, samtempe konsiderante, kiel rilatas la sufikso **igi** kun **iĝi** aplike al la samaj vortspecoj.

Se ni diras

La ĉarpentisto tabligas lignon (1)

tio signifas

La ĉarpentisto fabrikas tablon el ligno (2)

Ekde nun ni flankenlasos la aganton, senpersonigante ĝin aŭ simple ĝin ne menciante, ĉar ni bezonas emfazi aliajn elementojn.

La ekzemplo (1) povas resti jene:

Oni tabligas lignon (3)

Kaj se ni volas esprimi la saman ideon per la sufikso **iĝi**, ni diros

Ligno tabliĝas (4)

sen esprimo de la aganto, kiu ne interesas nin por la uzo, kiun oni donas al tiu konstruo.

Se anstataŭ apliki la sufiksojn **ig, iĝ** al substantivo, ni faras tion al adjektivo, ni ekhavos, ekzemple:

La muro blankiĝis (5)

kiu egalvaloras laŭ la signifo al

Oni blankigis la muron (6)

Tiujn du lastajn ekzemplojn oni povas esprimi respektive

La muro iĝis blanka (5')

Oni igis la muron blanka (6')

Nu bone, ni vidu, kio okazas, kiam ni aplikas tiujn sufiksojn al netransitivaj agverboj.

La lernanto paroliĝis (7)

Pro analogio kun la antaŭaj ekzemploj ĝiaj ekvivalentoj estos

Oni paroligis la lernanton (8)

Oni igis la lernanton paroli (8')

Oni observu, ke dum la transformo, tiom kun **igi** kiom kun **iĝi** aperas la primitiva vorto — laŭ la Akademio: la radiko kun sia pleonasma finaĵo.

Kvankam la nuna lingvouzo ne praktikas tiun funkcion, vere ne ekzistas ia motivo por ties rifuzo aŭ kondamno.

Ni vidu, kiel transformiĝas alia ekzemplo kun verboj ankaŭ netransitivaj, sed kun komplemento.

Oni igis la infanon iri al la lernejo (9)

Oni irigis la infanon al la lernejo (9')

Kvankam tiu uzo de la komplemento povas rezulti stranga al la oreloj de kelkaj e-istoj, ĝi neniel malobeas la Fundamenton. Tion konsiderante, oni povus diri lice:

La infano iriĝis al la lernejo (9")

Nu bone, se en ĉi tiaj transformiĝoj la komplemento de la primitiva verbo ("iri" en la ekz. 9) povas pluresti en la transformita (9"), ankaŭ estus lice fari la samon kun iu transitiva verbo kaj ties objekta komplemento. Ekz.

La infano manĝiĝis la supon (10)

Kompreneble, laŭ la Fundamento ne eblas diri

Oni manĝigis la infanon la supon (11)

sed ja estas komplete lica

Oni igis la infanon manĝi la supon (12)

Por precedentoj de tiaj uzoj, ni havas la sekvajn Zamenhofajn ekzemplojn:

"Vi nepre devas tion sciiĝi" (13)

"...por ke la publiko povu koniĝi tiun lingvon ĉiuflanke..." (14)

Ambaŭ ekzemploj cititaj en PIV.

La surpriza konkludo estas, ke la plej logika signifo de la sufikso **iĝ** aplike al transitivaj verboj estas ĝuste tiu, kiun oni uzas malplej, ĉar ĝi statas konsiderata kiel arkaismo, anstataŭ kiu oni rekomendas apliki la prefikson "ek-". Vere, tio estas iom teruriga, ĉar kondamni la ceterajn uzojn, kelkajn el ili profunde enradikiĝintajn, ne estus home ebla.

Aliflanke, estas evidente, ke, kiam ekzistas formoj kun pli ol unu signifo, tio devas ne esti tolerata en scienca lingvaĵo, inklude de la jura, ĉar juraj dokumentoj (kontraktoj, traktatoj, statutoj ktp.) devas ne prezenti malklaraĵojn.

Se oni donas superregon al unu el la kvar signifoj, plej prudente estus konsideri la ceterajn — krom la reale kondamnindajn — kiel arkaismojn aŭ kiel licencojn.

La rekomendoj, kiuj povus eliĝi el serioza kaj akademia studo de la problemo, servus por la jam menciitaj uzoj teknikaj kaj juraj, kaj indaj esti akceptataj flanke de institucioj kiaj UEA, ISAE, ILEI ktp., por ke ili utilu kiel ekzemploj por la konscia lingvouzanto.

Kompreneble, ajna decido, kiun tiurilate oni adoptus, ne estus tuj akceptota flanke de la e-ista publiko, sed iom post iom ĝi akceptiĝos, kondiĉe, ke ĝi estu trafe fundamentita. La alia problemo estus specifa por la instruistoj, nome: kiel kaj kiam instrui la diferencajn uzojn de la sufikso **iĝi**.

Resumo

Pere de analogia rezonado oni alvenas al la konkludo, ke el la kvar signifoj de la sufikso **iĝ**, aplike al transitivaj verboj, la plej akceptinda estas tiu, kiun hodiaŭ oni malmulte uzas. Ĉi tio naskas seriozan problemon tiom en la aspekto pure gramatika kiom en tiu de la instruado kaj praktikado de la lingvo.

Redakcia noto: La frazoj 9" kaj certe 10 efektive impresas strange; en ekzameno (ekzemple de ILEI/UEA) la ruĝa krajono senprokraste intervenus, tamen ni kuraĝas lasi ilin, ĉar ili formas integran parton de la argumentado en artikolo, kiu levas validajn demandojn pri grava temo, kiun ni volas malfermi al diskuto kaj reagoj.

ĈINIO:

Instru-programo de Esperanto por ĉinaj altlernejoj

Laŭ direktivo de la Unua Departemento pri Supera Edukado de la Eduka Komisiono (Ministerio) okazis en decembro 1988 en urbo Wuxi Konferenco pri la Instru-Programo de Esperanto kiel dua fremda lingvo por Superaj Lernejoj. La konferencon ĉeestis reprezentantoj de 11 universitatoj kaj institutoj, reprezentanto de la Ĉina Esperanto-Ligo s-ro Dai Song-En, akademiano de AdE kaj vicĉefredaktoro de *El popola Ĉinio* s-ro Li Shijun.

S-ro Wu Xiaoxian, respondeculo de Revizia Komisiono pri Fremdlingvaj Lerniloj por Superaj Lernejoj, ankaŭ ĉeestis la konferencon. Vic-profesoro Wei Yuanshu el la Fremdlingva Instituto de Ŝanhajo raportis pri la kunordiga kaj pliboniga laboro super la malneto de la Programo de post la unua konferenco en 1987, kaj resumis la bazajn principojn de la Ĝenerala Parto de la Programo. Post raportoj de vic-profesoro Fang Huiping el Ji'nan Universitato (pri vortaro), de prof. Zhang Danchen (pri gramatiko), de Li Ŝijun (pri komunikad-esprimoj), de vic-prez. Li Weilun el la Pekina Lingva Instituto (pri postuloj de lingva lerteco) sekvis diskutado kaj kontrolado super la teksto de la Programo. La konferenco fine unuanime akceptis la reviziitan tekston de la Programo. Ekde 1963 Esperanto estas oficiala fakultativa studobjekto (kiel dua fremda lingvo) por studentoj kaj magistriĝaj studentoj de fremdlingvaj fakoj en superaj lernejoj. Pli kaj pli da fremdlingvaj profesiuloj preferas elekti Esperanton kiel sian ekzamenaĵon en la kategorio de dua fremda lingvo, por atingi promociigon de akademia rango. La nova aŭtoritata Programo liveras ne nur al superaj lernejoj la postulojn kaj normojn en la instruado, sed ankaŭ al la akademia ekzamenado por la socio.

La konferenco esploris i.a. la preparajn laborojn por fondi Societon de Esperanto-Instruado en Superaj Lernejoj kaj elektis Wei Yuanshu, Li Weilun kaj Zang Danchen kiel membrojn de prepara grupo. Ĝia inaŭguro kaj unua simpozio verŝajne okazos en la aŭtuno de 1989.

Zang Danchen, Wuhan.

ILEI – forta kaj multmembra
Jes, sed nur kun via helpo!



Pri infanlibroj en Esperanto

Jacqueline GONIN
- dua parto -

Noto 1: La unua parto aperis en Internacia Pedagogia Revuo n-ro 1/1988. Mi bedaŭras, ke la ordo de la titoloj estis tiam ĥaosa: tion kaŭzis la fakto, ke mi unue intencis aperigi la recenzetojn surslipe. Ĉi foje la gvidlinio estas la aĝnivelo, en kreskanta ordo.

Noto 2: Principe la indikoj pri aĝoj estas jenaj, laŭ la franca lernosistemo:
"infanet-lernejo" = ĝis inkluzive la sesa jaro;
CP: 7a jaro; CE 1: 8a jaro; CE 2: 9a jaro; CM 1: 10a jaro; CM 2: 11a jaro.
Sed mi tre insistas, ke oni *ne* konsideru tiujn miajn indikojn koncerne la "nivelojn" rigide kaj dogme. Ili nepre estu nur orientiloj!


Titolo: **Kiu ne estas en la lito?**
Aŭtoro: Sena Keiko
Eldono: Infana verdejo, (Japanio) 1974.
Prezento: 24 p. 16x16,5 cm. Unu aŭ dulinia teksto sur maldekstraj paĝoj; bildoj sur la dekstraj.
Nivelo: Infanetoj.
Temo: Tre simpla. Rakonto sugestita de la bildoj.

Titolo: **La knabino, kiu ne volas iri al la infanejo**
Aŭtoroj: Siw Widerberg & Cecilia Torudd
Traduko: el la sveda, Malte Markheden
Eldono: Progreso-eldonejo, 1988.
Prezento: 33 p. 17x23,5 cm. koloraj bildoj, modernaj, ofte tutpaĝaj. Teksto de unu ĝis kelkaj linioj paĝe. Kartone bindita.
Nivelo: Infanetoj, C.P.
Temo: Obstina, rifuzema knabineto. Junaj gepatroj, eble ne sufiĉe firmaj. Sed fine la knabino cedas post ĉiu kaprico, ofte malfacile, kaj ĉio reordiĝas.
Teksto: Klara, facila kaj mallonga. La bildoj bone ilustras ĝin.

Titolo: **Granda Pando vizitis mian hejmon**
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1987.

Prezento: 24 p. 18,5x17 cm. Koloraj bildoj tutpaĝaj. Teksto du-kvarlinia, preskaŭ ĉiupaĝe.
Nivelo: CP, CE.
Temo: Malsana pandido estas flegata de knabeto, helpe de la gepatroj kaj bestkuracisto. Pandido kaj knabeto amikiĝas, sed tamen oni devas resendi la resanigitan pandon al la arbaro, al kiu ĝi sopiras.
Teksto: Iom malgrandaj litertipoj. Bona okazo por instrui ilin.

Titolo: **Plaŭ! plaŭ!**
Aŭtoro: Adaptis kaj ilustris Jang Siaŭĉun
Eldono: Ĉina Esperanto-eldonejo, Pekino 1985.
Prezento: 54 p. 18x21 cm. Fantaziaj kolor-bildoj k. unu-du-linia teksto ĉiupaĝe.
Nivelo: CP, CE.
Temo: Fakte estas fablo, kies subtitolo povus esti "historio de senbaza famo" - disvastigata de timema kuniklo, kiu kreas panikon ĉe la bestoj, ĝis... rano haltigas ĝin.
Teksto: Simpla, sed multaj bestnomoj devas esti konataj.



Titolo: **Songo de Ĝengen**
Aŭtoro: Teksto kaj bildoj de Mej Jing
Eldono: Ĉina Esperanto-eldonejo, Pekino, unua eldono 1986.
Prezento: 45 p. 18x16,5 cm. Koloraj bildoj ĉiupaĝe; teksto unu ĝis trilinia paĝe.
Nivelo: Infanetoj, CP, CE.
Temo: Trodorlotita knabino ne sufiĉe sin nutras, donante sian manĝaĵon al dombestoj, malgraŭ la admonoj de la patrino, ke ŝi malfortiĝos. Iam ŝi endormiĝas kaj songas. Ŝi sinsekve vizitas mondon de insektoj, testudo kaj heliko, abeloj. Sed ĉiam ŝi estas tro malforta por plenumi taskojn simplajn. Terurita ŝi vekiĝas kaj komprenas, ke ŝi devas manĝi.
Teksto: Simpla kaj mallonga. Bone ilustrita bilde. La tuto impresas poezie.

Titolo: **Ora Bukceno**
Aŭtoro: Ĉina popola rakonto adaptita de Huang Ĉjiĝong. Ilustrita de Ŭeju.
Prezento: 38 p. 18x20,5 cm. Ĉiupaĝaj bildoj. Teksto 2-4 linioj paĝe.
Nivelo: CE kaj eble pli.

Temo: Ĉarma ferakonto. Simpla fiŝisto, post pluraj mirindaj sorĉaj eventoj kaj teruraj elprovoj fine edziĝas kun bela princino.
Teksto: Sufiĉe facila.

Titolo: **Fabeloj**
Aŭtoro: Verkaĵo kaj ilustaĵoj: Mirka Tomeĉkova - Ĉeske Dudejovice (Ĉeĥoslovakio)
Eldono: Libroservo F.L.E. Nederlando, 1987.
Prezento: 16 p. 20,5x29,5 cm. Bildrakonto: teksto meze de nigra-blankaj bildoj.
Nivelo: elementa lernejo.
Temo: Kvar fabeloj: 'Pri saĝulino' - 'Salo super oro' - 'Feliĉo kaj racio' - 'Princo Ba-Ja-Ja'.
Teksto: Facila, konciza (ja helpas la bildoj). Mi notis du erarojn en la dua fabelo (eble kulpas la preskoboldo!): mislokita artikolo: "la same" p.7., "vi povas" por "vi povos reveni" ankaŭ p. 7.

Titolo: **Koko kantisto kokerikisto**
Aŭtoro: Petras Cvirka trad. el la Litova: Adomas Vaitilaviĉius
Eldono: Vilnius Vyturys 1987.
Prezento: 36 p. 25x16 cm. Kolore ilustrita. Agrable grandlitera presado.
Nivelo: CE, CM 1. Postulas bonan legkapablon.
Temo: Fabloj enscenigantaj bestojn. Tri fabloj: **Kiel pego abion segis - Ruzaĵoj de vulpo - Pri koko kantisto kokerikisto kaj liaj infanoj.** La aŭtoro diras "fabeloj", mi preferas "fabloj", ĉar fakte ili entenas instruon.
Teksto: La unua kun mallongaj frazoj; bona trejnado por uzo de akuzativo; sufikso -ĉj-; la dua uzas kelkajn vortojn ne tiom oftajn (klafto, forstisto, rungo); formojn en -iĝinta. Ĝeneralaj rimarkoj: kelkaj rimaĵoj, ofte prozo kun asonancoj.

Titolo: **Transiro de ponto**
Aŭtoro: Bildrakonto de Ŝjaŭjing
Eldono: Ĉina Esperanto-eldonejo Pekino, unua eldono 1986.
Prezento: 18 p. 18x20,5 cm. Bildoj nigra-blankaj.
Nivelo: Infanoj en lerneja aĝo kaj E-komencantoj.
Temo: Diversaj, humuraj; taŭgaj por paroligi kursanojn aŭ por konversaciaj rondoj.
Teksto: Ne ekzistas! Ĉiu paĝo entenas unu historion en 8 aŭ 9 bildoj kun titolo 'Rigardu lin!' - 'Transiro de ponto' - 'Flegado al vundito'....

Titolo: **Plupo en la grandarbaro** (vidu en *unua parto* por komuna trajtoj de tiu kolekto)
Eldono: Progreso-eldonejo, Motala, Svedio 1987.
Nivelo: CM 1,2 kaj eble iom poste.
Temo: Promeno de Plupo en la grandarbaro, renkontiĝo kun bestoj. La kastoroj bezonas arbojn. Laboro de homoj: lignaj domoj ktp. Ankaŭ ili bezonas arbojn, detruas multajn sed ankaŭ plantas novajn. Inteligenta nocio de ekologio (sen uzo de la vorto).
Teksto: Bona stilo. Vortprovizo: nom de kelkaj arboj, arbaraj plantoj, fruktoj kaj bestoj.

Titolo: **Plupo kaj la ursidoj** (sama kolekto kiel ĉi supre)
Eldono: Progreso-eldonejo, Motala, Svedio 1987.
Nivelo: CE 2, CM.
Temo: Tie ĉi Plupo amikiĝas kun ursofamilio kaj tiel ekkonas la morojn de tiuj bestoj. Ludoj de la ursidoj, ties vintra dormado ktp.
Teksto: Vortprovizo malpli granda ol en la aliaj samseriaj libretoj. Malofta vorto: "empetro" vd. PIV. Stileraro: "sed unue ni manĝos nin sataj" (p.22) = ni manĝos ĝissate.

Titolo: **Ĉinaj popularaj ludiloj**
Aŭtoro: Tian Yuan
Eldono: Fremdlingva Eldonejo Beijing. Unua eldono 1980.
Prezento: 78 p. 18,5x21,5 cm. Bele bindita. Dupaĝa antaŭparolo kaj pli ol 70 reproduktoj de pentraĵoj montrantaj ludilojn popularajn kaj tradiciajn faritaj de la aŭtoro mem. La nomoj de la ludiloj aperas ĉine kaj Esperante.
Nivelo: Povas plaĉi ne nur al infanoj, sed al plenkreskuloj, kiuj ŝatas tradiciajn artojn kaj objektojn.



Dek kvin jaroj da instruada progreso

laŭ raporto de Mohammad KARAMUDINI
Irana reprezentanto de ILEI

Ni aperigas resumon de konciza sed inform-riĉa raporto pri la informa, eduka kaj kultura agado dum la lastaj dek kvin malfacilaj jaroj en Irano. Ĝi estas prezentita laŭpunkte:

1. Dum kvardek jaroj ĝis 1975 Esperanto estis malpermesita. La komenco de nova epoko estis signalita per la apero de 33-paĝa artikolo de Dr. M.H. Saheb-Zamani pri la Esperanto-movado: "La disfalo de la Babela Turo: Homa kaj Lingva Revolucio" en revuo de la Universitato de Tehrano *Daneŝkade*. Ampleksa raporto pri tiu artikolo kaj ĝia sekvo kronis memorindan numeron de revuo *Esperanto* (dec. 1979, p.200).

2. Kampanjo de publika klerigado estis starigita, per uzo de gazetaro, radio televido kaj publikaj prelegoj. (*Esperanto* okt. 1975, p. 174; nov. 1978, p.191; dec. 1981, p.209).

3. Eldono de bazaj informaj libroj pri Esperanto:

- 1976: *La kulturo kaj la revolucio lingva — Esperanto*, 36 paĝoj, Univ. de Tehrano.
- 1977: *Literaturo de l'espero: persa enkonduko en la literaturon de la Internacia Lingvo Esperanto.* 37 paĝoj, Univ. de Tehrano.
- 1978: *Morgaŭigo de hodiaŭ — dialektiko de pensado kaj lingvo* 184 paĝoj, Atai Press, Tehrano.
- Multaj pri-Esperantaj artikoloj en diversaj ĵurnaloj.

4. Eldonado de lerno-materialo paralele progresis:

- *La dua lingvo — Esperanto-Persa Lernolibro*, 256 paĝoj, Atai Press, Tehrano, 1976. Aperis en kelkdek mil ekzempleroj. (*Esperanto* mar. 1977, p. 41; nov. 1978, p. 191).
- *Esperanto-Persa Vortareto*, J.A. Saheb-Zamani, Atai Press, 24 paĝoj, 1977.
- *La Nobla Korano*, 3a represo, Tehrano, 1978.
- *Laŭleciona Vortaro de la libro 'Karlo' de E. Privat*, R. Gazanfarian, Iran-Esperanto-Serio 3; 20 paĝoj, 1981.
- *Laŭ-leciona Vortaro Esperanto-Persa de la libro 'Praktika kurso en Esperanto' de F. Szilagyi*, Iran-Esperanto-Serio 4, 60 paĝoj, 1982.

5. Instruado de Esperanto en pli ol 80 kursoj diversnivelaj, por diversaĝuloj laŭ diversaj profesiaj grupoj diversloke tra Tehrano. (*Esperanto* dec. 1976, p.200).

6. Enkorpigo de la idearo de Internacia Lingvo en du mezlernejaj lernolibroj pri sociaj sciencoj.

7. Regula instruado kun fin-ekzamenoj por mezlernejaj instruistoj kaj oficiroj de la irana aer-armeo.

8. Arigo de 25 mil guldenoj pere de UEA cele al la eldono de *Islama Enciklopedio*

9. Informado al Unesko pri la Esperanto-movado en Irano kaj instigo al ĝi kompreni ĝian gravecon por la Tria Mondo. Subtenado de la movado por akceptigi Esperanton ĉe Nealiancitaj Landoj. (*Heroldo* jan. 1983).

10. Efika pledo internacia por eldono de scienc-teknika literatuero en Esperanto; pri la sukceso de tiu pledo i.a. atestas la revuon *Esperanto* jene: "Responde al la premo de la nova movado en Irano, Esperanto-Societo de Ĉikago (Usono) kaj ELNA entreprenis la tradukadon de kemia lernolibro."

11. Instalado de Irana Esperanto-Domo por pli koncentri la disajn agadojn kaj ligi la iranajn esperantistojn kaj faciligi internacian kunlaboron. (*Esperanto*, dec. 1981, p. 209)

12. Starigo ekde 1982 de la serio IER: *Iran-Esperanto Raportas*, kiel internacia gazetara servo por disvastigi la voĉon de la irana movado, kiel parto de la tria mondo.

13. Intensa altnivela ĵurnalista trejnada kurso por 12 elektitaj junaj esperantistoj en la Irana Esperanto-Domo.

14. Kunlaborado kun Gaston Waringhien por enkorpigi Esperantajn robaiojn de Kajjamo tradukitajn de G. Waringhien en *Robaioj de Kajjamo en 30 lingvoj*, monumenta eksterordinara libro de la eldonejo Padide en 1987, okaze de la tiujara Unua Internacia Libro-foiro en Tehrano.

15. Kunlaborado kun William Auld kaj la eldonejo Padide por traduki kaj aperigi la gazalaron (poemaron) de Hafezo aperigita okaze de la 600-jara jubileo de la poeto. (*Heroldo*, feb 1989)

16. Trejnado de du aktivuloj el Pakistano per du apartaj privataj intensaj kursoj por s-ro Saeed Ahmad Farani en 1987 kaj s-ro Mohammed Naeem Javaed en 1989.

17. Eble plej impone estas la okazigo de 109 sinsekvaj bazaj kursoj de Esperanto , seninterompe de post 1975 spite kelkajn ege malfavorajn periodoj, inkluzive de bombardado kaj misilatakoj. Tiuj kursoj estis persone gviditaj de la motoro de la irana movado, d-ro M.H. Saheb-Zamani.

REFORMITA GIMNAZIO EN AŬSTRIO

Post 14-jara eksperimenta fazo realiĝos nova instruplano por la gimnazio ekde septembro 1989. Temas pri la 5a ĝis la 8a klasoj de la gimnazio (= 9a ĝis 12a lernojaroj = ĝenerale 15a ĝis 18a vivojaroj).

En la onteco la gelernantoj povos elekti inter tri ĉefaj eblecoj: gimnazio, realgimnazio kaj ekonomia gimnazio. En ĉiuj estos instruota jenaj fakoj: religio (nedeviga), germana aŭ gepatra lingvo, unua "vivanta" fremdlingvo (plej ofte la angla), historio, geografio, matematiko, biologio, fiziko, kemio, psikologio, informadiko, muziko, arta desegnado, gimnastiko. La diferencoj inter la diversaj gimnaziaj tipoj estas:

Gimnazio: instruado de la latina lingvo.

Realgimnazio: instruado de la latina aŭ alia dua "vivanta" lingvo; pli da matematiko, biologio, vivmediscienco, fiziko, kemio;

Ekonomia gimnazio: instruado de "dommastrado kaj nutrado".

Ĉiuj gimnazioj ekzistas kiel "longa formo", t. e. de la 3a ĝis la 8a klaso. La 1a kaj 2a klasoj estas por ĉiuj tipoj egalaj. Novaĵo estas "elektendaj devigaj fakoj", kiujn oni povas elekti laŭ siaj interesoj: religio, gepatra lingvo, fremdlingvoj, historio, politiko, juro, geografio kaj ekonomio, matematiko, teknika desegnado, biologio, kemio, fiziko, psikologio, pedagogio, muziko kaj arta desegnado. Dum la 6a ĝis 8a klasoj oni devas viziti entute 8 ĝis 12 horojn/semajno el tiuj fakoj.

E-o ekzistas nur kiel nedeviga fako en la 3a kaj 4a klasoj de la ĉeflernejo, sed nur teorie, ĉar nun mankas kaj geinstruistoj kaj gelernantoj.

Jen superrigardo pri la aŭstria instrusistemo:

Nomo	Lernojaro	Vivojaro	Klaso	Rimarko
ELEMENTA	1	7	1	deviga
LERNEJO	2	8	2	
	3	9	3	
	4	10	4	
ĈEFLERNEJO	5	11	1	deviga
AŬ	6	12	2	
GIMNAZIO	7	13	3	
	8	14	4	
POLITEKNIKO	9	15	1/5	deviga
METILERNEJO	10	16	1/6	nedeviga
AŬ	11	17	2/7	
GIMNAZIO	12	18	3/8	
UNIVERSITATO	13-16(18)	19-22(24)		nedeviga

Tiom da horoj semajne la gelernantoj devas viziti:

Klaso:	5a	6a	7a	8a	elektendaj (6-8)
Gimnazio	34	32	31	33	8
Realgimnazio	33	31	32	32	10
Ekonomia Gimn.	32	34	29	31	12

La unuaj kvar kolumnoj indikas devigajn fakojn, la lasta indikas elektendajn kaj poste devigajn fakojn en la 6a ĝis 8a klasoj.

Pliajn detalojn vi povas legi en la (bedaŭrinde nur germanlingva) broŝuro "Die neue Oberstufe", kiun vi senkoste povas mendi ĉe: Bundesministerium für Unterricht, Minoritenplatz 5, A-1014 Wien.

Walter KLAG

• Plia popol-lernejo

Ni raportis en la antaŭa numero pri la popola altlernejo en Karlskoga. Nun dua tia lernejo en Skandinavio intencas proponi Esperanto-kurson. Temas pri la najbarlanda Nordmore Popola Altlernejo en Surnadal, rande de fjordo ĉ. cent kilometrojn sud-okcidente de Trondheim. La grandformata ilustrita prospekto prezentas la kursojn por la lernojaro 89/90. Tipaj studobjektoj estas desegnado, ceramiko, teatro, radio kaj komunikado kaj norvega lingvo por eksterlandanoj (tiu lasta anoncita angle kaj Esperante). La temo 'Lingvo kaj literaturo' proponas en la dua semestro kvar-monatan Esperanto-kurson sub la gvido de Kirsti Fossgard. La gelernantoj vivas kune dum naŭ monatoj en la lernejo mem, kaj fakte formas edukan komunumon.

Paranteze, el Norvegujo venis lastatempe altkvalitaj turismaj publikaĵoj: represo de la oficiala broŝuro de la Ministerio de Eksteraj Aferoj, kaj nun ricevita kun la lerneja prospekto, Esperanta versio de la baza kolora faldfolio de la norvega fervojo (NSB) kune kun bona mapo de la lando.

• Nacia studenta renkontiĝo

Malmultaj landoj havas Esperanto-kursojn en tiom da universitatoj kaj superaj lernejoj por pravigi nacian studentan renkontiĝon. Tamen Hungario falas en tiun kategorion kaj tion pruvas aprila renkontiĝo en montetara vilaĝo Velem (apud Szombathely), kiu logis pli ol sesdek studentojn el universitatoj (ELTE Budapest, KLTE Debrecen, JATE Szeged) kaj superaj lernejoj (Instruistaj kolegioj de Szombathely, Eger kaj Esztergom). Kvar el ili havas oficialajn kursojn.

Krom la interkonatiĝo kun agrabla gitarludo kaj la bone sukcesinta konkurso, la programo inkluzivis fakajn prelegojn, renkontiĝon kun la parolanta komputilo, teatran prezentaĵon de ELTE studentoj, ekskurson al Kőszeg kaj urbo-rigardadon en Szombathely.

La aranĝo revigligis la malnovan tradicion de renkontiĝo de studentaj rondoj. La entuziasma etoso en Velem kondukis al decido igi la aranĝon ĉiujara kaj la sekvan organizos la studentoj en Szeged.

ELTE-studentoj partoprenantaj la aranĝon en ELTE



• Monda turismo

"Esperantotur" de Monda Turismo (str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz, Pollando) invitas al riĉa programaro, i.a. al Konstanta Internacia Esperanto-Lernejo kaj Kurso por Instruantoj de Esperanto (ĉi-lasta dum jun.26 – jul. 09, sed eble ankaŭ venontjare). Petu informojn.

• Interland

"(...)Ĉar la ekonomia medio estas la plej grava nuntempe kaj influas la politikajn decidojn same kiel nian ĉiutagan vivon, E-o devos pruvi sian efikon sur tiu grundo se ĝi volos agnoskiĝi kaj amase uziĝi. INTERLAND kreiĝis por tio; INTERLAND atendas nun la amasan subtenon de ĉiuj e-istoj por plu kreski kaj kreskigi la rolon kaj kredindon de E-o.(...)vi ĉiuj povas subteni ĝin konkrete: aĉetante akciojn de la firmao INTERLAND (1 akcio valoras 20 EKU aŭ 140 FRF, kaj rajtigas proporcian parton de la profitoj). Petu la prezenton de la INTERLANDaj servoj kaj financoj, ĉe:

INTERLAND, 4 rue de la Monnaie, F-30400 Villeneuve-les-Avignon, tel. (33) 90 25 43 77. (La tuta dosiero kostos al vi 2 EKU, nur se vi ne aĉetos INTERLANDajn akciojn; kion vi povos pagi per poŝtmarkoj de via lando.)"

• Eurokka

EUROKKA celas diskonigi E-on ĉe la rokbandoj kaj la junularo. Ĝi administras rok-provludejojn (10 studioj, en kiuj provludas dekkvino da

Pollando: 20 infanoj kaj 15 junuloj en du hobiaj klasoj en Etk. 20 infanoj en hobia klaso en Lomza.
Ne eblas scii kiom da lernantoj aldoni, sed la nombro de kursoj kreskas de 83 ĝis 161.

MIE! Monato de Internacia Enketado

Februaro enhavas la Semajnon de Internacia Amikeco (SIA), sed septembro **estas** la Monato de Internacia Enketado (MIE). Jen nova movada tradicio, kiun ILEI volas lanĉi. En tiu monato ĉiu unuopa instruisto en Esperanto-klaso estas solene petata komuniki la detalojn pri tio al sia Landa Sekcio de ILEI, kaj al la centra ILEI, ĉu rekte, ĉu pere de tiu landa sekcio. Ni aperigas freŝan enketilon ĉi tie, en *Juna amiko* n-ro 89/3 kaj ni dissendas jam en julio enketilojn al la sekcioj. Alvoko aperos en *Esperanto* de julio-aŭgusto.

Unuavice ni volas informojn pri klasoj en lernejoj je la antaŭ-universitata nivelo, t.e. kun lernantoj inter 5- kaj 18-jaraj. Oni rajtas raporti ankaŭ pri miksaĝaj grupoj, kaj pri plenkreskaj grupoj, nur se ili estas starigitaj oficiale kadre de iu eduka instanco.

Pri la universitata nivelo daŭre respondecas s-ro Germain Pirlot el Belgio, kaj li ankaŭ ĝuste en septembro enketos denove pri tio. Ni du statistikas aparte, sed restas en kontakto kaj interŝanĝas informojn kaj rezultojn. Bonvolu do atenti ambaŭ enketojn!

Aliloke vi povas legi ĝisdatigon de la enketado el 1989. Por ke ĉi-jare la rezultoj venu pli komplete kaj frue, ni petas la aktivan kunlaboron de la sekcioj septembre arigi plenajn informojn sur sia teritorio kaj ĝin plusendi al la centra ILEI. Bv. uzi aŭ multobligi nian enketilon tiucele, estos bone se instruisto plenskribos dufoje la enketilon (aŭ kopios ĝin), tiel ke la landa sekcio povos teni unu kopion kaj plusendi duan al ILEI.

Bonvolu nepre klopodi resendi la rezultojn kiel eble plej frue post septembro, *plej malfrue ĝis la jarfino*, por ke la rezultoj povu aperi dum la priraportata jaro ankoraŭ fluas, tiel ke internaciaj kontaktoj estu starigeblaj.

Enketiloj estos disdonitaj en la *Tago de la Lernejo* en Brajtono, redaktoroj de gazetoj, kiuj pretas aperigi la enketilon septembre povos tie ricevi prespretan originalon.

Nia unua enketado portis iom mizeran rezulton – ne manku ĉi-foje. Prenu la plumon septembre, skribu klare kaj legeble – estu fidela MIE-ulo!

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

ILEI

Enketilo pri lerneja instruado de Esperanto 1989/90

Bonvolu resendi ĉi tiun demandilon al *Juna amiko*, Hungara Esperanto-Asocio, pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario ĝis plej malfrue la 31a de decembro 1989. Bonvolu skribi tre klare kaj respondi aparte por ĉiu klaso.

Urbo: Lando:

Nomo de la lernejo:

Adreso de la ☐ lernejo/ ☐ instruisto:

Nomo de la instruisto:

Ĉu profesia instruisto? JES/NE Dungito de la lernejo? JES/NE

Kiom da lernantoj de la kurso? Kiomaĝaj?

Komenco de la kurso: Atendata daŭro

Kiom da studhoroj entute apartenas al la kurso?

Kiom da studhoroj okazas ĉiusemajne? (Indiku kaj akademiajn kaj horloĝajn horojn.

TURNU!

Oficialeco de la kurso:

Ĉu la kurso okazas ene de oficialaj horoj? JES/NE

Ĉu ĝi estas plene oficiala lerneja stud-temo? JES/NE

Se ne, ĉu partopreno estas deviga post elekto? JES/NE

Aliaj klarigoj:

Ekzamenoj kaj kreditoj:

Ĉu plenumo de la kurso kondukas al iuspeca kredito en la lerneja sistemo?

Ĉu fine de la kurso okazas ekzameno? JES/NE

Se jes, kiu starigas aŭ rekonas tiun ekzamenon?

Lerniloj

Kiujn lernolibrojn kaj materialon vi uzas? (Aŭtoro, titolo)

Internaciaj kontaktoj

Ĉu lernantoj jam korespondas internacie? JES/NE

Ĉu vi volas starigi korespondadon – klasan ☐ individuan ☐

Ĉu alispecan internacian kunlaboron aŭ helpon vi volas?

HONORAJ MEMBROJ

Zlatnar Peter (YU, 1984) – Dazzini Mario (I, 1985) – Erbetta Marcel (CH, 1986)
Klemola Irja (SF, 1986) – Olsson Olle (S, 1986) – Toczyński Jozef (PL, 1986)
Sonnabend Helmut (D, 1987) – Dazzini Catina (I, 1988) – Szerdahelyi István (H, 1988)

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Argentino : Alfredo Juan Valle, Santa Fé 497, RA-1708 Morón (B.A.)
Aŭstrujo : Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgujo : Marc Demonty, Schoolstraat 3, B-1710 Dilbeek
Brazilio : Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
Britujo : Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 82D
Ĉeĥio : Vêra Barandovska, Volgogradská 41, CS-70400 Ostrava 3
Ĉinujo : Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normal University, 430070 Wuhan, PR China
Finnujo : Pentti Järvinen. Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
Francujo : Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim
F.R. Germanujo: Stefanie Tucker, Alatseestr. 14, D-8900 Augsburg
Germana D.R.: Till-Dietrich Dahlenburg, Str. der DSF 13, DDR-2722 Brüel
Hispanujo : Manuel López Hernández, Sol 75, E-41003 Sevilla
Hungarujo: : Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo : David Mager, P.K. 4246, IL-84142 Beer-Ŝeva
Italujo : Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Japanujo : Toi Kunio, 1448-1 Simotakajyanagi, Kazo-si, Saitama 347
Jugoslavio : Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Porotorož
Korea Resp. : Gilsu So, Sodaemun, P.K. 59, Seoul-120
Nederlando : D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko : Ian Richmond, 66 Naomee Cres., London, Ont. Canada N6H 3TS
Norvegujo : Åge Melå, Beverstien 2, N-3190 Horten
Pollando : Tadeusz Ejsmont, ul. B. Bartoka 1 m 49, PL-92 547 Łódź
Portugalio : Alexandre Kasesa, Rua Actriz Palmira Bastos 10, 4'B, P-1900 Lisboa
Sanmarino : Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 San Marino
Slovakio : Rûzena Vojtechová, Bytovky blok "B", CS-05960 Tatavanská Lomnica
Sovet-Unio : Palu Johannes, Solme 21, SU-200016 Tallinn, Estonio
Sud-Afriko : Jape Spoelstra, Posbus 20185, Noordbrug 2522, Suid-Afrika
Svedujo : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby
Svisujo : Edgar Jobin, F.W. Dubois 11, CH-2400 Le Locle
Venezuelo : J.E. Bachrich, Apartado 3833, YV-1010 A Caracas
Zairio : Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

REPREZENTANTOJ

Bangladeŝo	: Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000
Centrafrika Resp.	: Luc Feidangai, B.P.960, Bangui
Ĉilio	: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago
Irano	: Mohammad Karamudini, P.O.Box 13445-747, Tehran/Iran
Nigerio	: Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Ekpoma Bendel
Tanzanio	: Mramba Simba, S.L.P. 1051, Bunda Mara

LABORKOMISIONOJ

Statistiko	: Germain Pirlot, Kemmelbergstraat 5, b. 3, B-8400 Oostende
Didaktikaj lud(il)oj	: Georges Sossois, rue de la Consolation 2, B-6400 Couvin

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO	: (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C) : 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris. Reprezentantoj de ILEI: James Fairbank, 6 Avenue Th. Rousseau, F-75016 Paris François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris
UEA	: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam
IEI	: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag
KCE	: Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Kontribuaĵoj al IPR

tajpitaj kun duobla interspaco kaj marĝenoj, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon)

Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 40 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 00 Hörby (Svedio).

2) poŝtĝirkonto: 3789 64 — ILEI 2814 — UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)